

La Merkato

la Laŭokaza Novaĵletero de la

Internacia

Komerca kaj

Ekonomia

Fakgrupo

n-ro 27

Julio 1989

IKEF * 1984

● Dum la 74-a Universala Kongreso en Brajtono okazos ankaŭ nia ĉi-jara ĝenerala kunveno, al kiu mi, nome de IKEF, ĝoje invitas vin. Ni renkontos vendrede, je la kvara de aŭgusto 1989, je la 10.⁰⁰ horo ĝis la 11.³⁰ horo en salono Holmes.

T A G O R D O

1. jarraporto
2. financa raporto
3. decido pri la deficitlikvido
4. malsargigo de la estraro
5. estraraj novelektoj
6. diskuto pri estontaj projektoj
7. diversajoj

La kunveno estas, kiel kutime, malferma, ankaŭ por gastoj. Bonvolu informi interesitojn, konatajn de vi. Novaj ideoj kaj kunlaborontoj estas ĉiam bonvenaj.

/dk

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef Braun,
Prezidanto kaj Generala Sekretario; S-ro Roland
Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether;
S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Lawrence Mee;
D-ro Marco Picasso; S-ro Seikó Yamasaki. Revizoro
por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo:

Ce s-ro Franz Josef Braun, Hornisgrindestraße 8,
D-7580 Bühl 16, FR Germanio

Financa sidejo kaj membro-administrado:

Ce s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97,
B-8000 Brugge, Belgio

Redaktora sidejo:

Ce s-ro Daniel König, Schwarzwaldstraße 47
D-6800 Mannheim 1, FR Germanio
telefono: +49.(0)621.821710

Enhavo:

Jarĉefkunvena invito		1
La estraro; enhavo		2
Saluton	König	3
Malfermita letero de la prezidanto		
	F.J.Braun	4
Kiu intencas kunlabori kun la Komisiono de la Eŭropaj Komunaĵoj?	Polerani	5
Translogigintoj		6
Esperantaj nomoj por entreprenoj aŭ produktoj agadpropono de	D-ro Picasso	7
Bonvenon novaligintoj		8
Kotizoj, kontoj kaj perantoj		9
KCE-seminario		10
Reklamtarifoj, elvido ktp.		12

Saluton

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj,
gekolegoj kaj gesamideanoj,
karaj gelegantoj,

la Laŭokaza Novaĵletero sangis
gian aspekton kaj sian nomon. El LN
iĝis LM. "La Merkato" estu estonte nia
organo.

Nove, ankaŭ ĝia redaktoro: Daniel König
estas mia nomo, loĝante en Mannheim, FR
Germanio.

Redakti la bultenon de
la IKE-a fakgrupo mi
konsideras kiel elvoko,
kiel tasko kaj honoro.
Nek laboranto nek
emerito nomiĝas mia
stato; mi ankoraŭ studas
en la universitato ĉi
urbe. Bonvolu subteni
mian klopodon bone
plenumi la transprenitan
taskon pere de viaj
kontribuoj.

La sango de la titolo rezultis el la
deziroj, oficale periodigi la organon kaj
oni nomon al ĝi, kiu rilatas al la fako
rekte.

Esperante je fruktedona kunlaboro mi
salutas:

utiligan legadon!

/dk

La Merkato



Malfermita letero de la prezidanto

Bühl, junio 1989

Estimataj gekolegoj,

antaŭ viaj okuloj vi trovas novstilan Laŭokazan Novaĵleteron. Ĝi estas rezulto de longdaŭra diskutado en la estraro pri plibonigo de nia komunikilo. La iniciaton al tio faris nia membro s-ro Hans Wiersch (IKEF 19), Welzheim, FR Germanio, kiu ankaŭ proponis la nomon "La Merkato". Pri tiu iniciato ni sulkas multan dankon al s-ro Wiersch.

"La Merkato" aperos kvarfoje jare, nome en januaro, aprilo, julio kaj oktobro. Ĝi estas redaktata de s-ro Daniel König, juna studento pri ekonomiko en Mannheim, FR Germanio. La kopiadon kaj forsendadon prizorgas favorkoste s-ro Roland Rotsaert en kunlaboro kun la Flandra Esperanto-Ligo.

La gisnuna redaktoro, s-ro Lawrence Mee, Eastleigh, Britio, demisiis de sia posteno. S-ro Mee kaj mi estis iniciantoj de IKEF. Ekde tiam, do ekde 1984, kun mallonga interrompo, li redaktis nian Laŭokazan Novaĵleteron. En la nomo de la estraro mi elkore dankas al s-ro Mee pro lia sinoferema laboro por IKEF.

Al la nova redaktoro, s-ro König, mi deziras multe da sukceso ankaŭ multajn kontribuojn flanke de nia membraro por nia "Merkato".

Franz Josef Braun

Nome de la estraro mi provas esprimi la dankon de IKEF por viaj donacoj; en belgaj frankoj:

Mee 2805 + 678;
Braun 1313;
Lee 1480;
Pirlot 200;
sennome 20000;

DANKON!

Kiu intencas kunlabori kun la komisiono de la Eŭropaj Komunajaoj?

Polerani

Okaze de la kunveno de IKEF dum la Universala Kongreso en Roterdamo mi informis, ke, kiel profesia konsultisto pri financaj, ekonomiaj kaj fiskaj problemoj al mezaj kaj malgrandaj entreprenoj, mi ricevas regule kaj senpage la **Monatan Leteron**, kiun la Komisiono de la Eŭropaj Komunajaoj eldonas en naŭ lingvojn (angla, dana, franca, germana, greka, hispana, itala, nederlanda kaj portugala). Tiaokaze mi esprimis la opinion pri la utileco, ke la eldonisto aperigu la saman "Leteron" ankaŭ en Esperanto kaj oni kontraŭproponis al mi, ke mi mem sendu la Esperantan tradukon al la Komisiono de la Eŭropaj Komunajaoj.

Mi tion faris kun la kunlaboro de la geamikoj de mia urba klubo kaj ricevis la Esperantan reagon, kiun vi povas legi malsupren.

Mi nun proponas, ke ĉiumonate IKEF-anoj loĝantaj en unu de la landoj membraj de la Eŭropaj Komunajaoj sin devontigu al traduki, laŭvice, la tekston de malsama Monata Letero el sia lingvo en Esperanton, poste sendante ĝin al la

Komisiono de la Eŭropaj Komunajaoj
Generala Direkcio pri informo, komunikado,
kulturo
rue de la Loi, 200
B-1049 Bruxelles.

Tiamaniere, se ni havus kunlaborantojn en ĉiu lando de la Eŭropa Komunaĵo, ĉiu inter ni tradukus post naŭ monatoj.

Cu ni sukcesos, bombardante tiun Komisionon, konvinki ĝin pri la utileco de nia lingvo kaj de la eldono ĉiumonate de la esperanta traduko kune kun la tradukoj, kiuj nun aperas en la aliaj naŭ naciaj lingvoj de la Eŭropa Komunaĵo?

Gianfranco Polerani

Kiel redaktoro mi petas la rajton publike eltiri kelkajn demandojn el la teksto, demandante d-ro Polerani.

- Pri kio temas en tiu **Monata Letero**?
- Kiom da fakuloj/legantoj ricevas ĝin?
- Kiom da pagoj ĝi enhavas?
- Cu ĝi estas malferma afero, akirebla por (ni) ĉiuj?
- Cu ĉiu ricevanto ricevas nur unulingvan leteron, aŭ tutan kajeron naŭlingve?

Ni forte batu la komisionon pere de ege regula traduklaboro. En kazo de unu lingvo ni celu **la duan**; en kazo de naŭ lingvoj ni celu **la dekan**. Ambaŭflanke, sendube indas! /dk

IKEF-anoj transloĝiĝis

Dankinde ne ĉiuj, sed jenaj kun novaj adresoj

S-ro Hans H. **Bühl** (IKEF 26), Albstraße 27
D-7410 Reutlingen, FR Germanio
telefono: +49.(0)7121.37263

S-ro Bengt-Arne **Wickström** (IKEF 40)
Instituto por Ekonomiko
Johano-Kepler-Universitato de Linz
A-4040 Linz-Aŭhof, Aŭstrio

S-ino Claudine **Dyel** (IKEF 49), 5, rue Franche
F-84000 AVIGNON, Francio

STATUTO

de la

INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO

(aprobata dum kunsido je 1985.08.06 en Augsburg)

1. Tiu ĉi Statuto aludas al unuiĝo kun la titolo, Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, por kiu taŭga mallongigo estas IKEF, aŭ en la nuna teksto: la Fakgrupo.
2. La Fakgrupo konsistas el Esperantistaj organizaĵoj kaj individuaj personoj. La sidejo de la Fakgrupo estas en Rotterdam, sed translokiĝo de la sidejo eblas, se necese pro ŝanĝo en la cirkonstancoj de la Fakgrupo.
3. La Fakgrupo havas la ĝeneralan celon disvastigi la uzadon de la internacia lingvo, Esperanto, kaj plifaciligi ĉiuspecajn rilatojn inter la homoj en la kampoj de komerco, ekonomio kaj ekonomia scienco, indiferece pri la nacieco, ŝtataneco, raso, religio, politika sinteno kaj gepatra lingvo de la individuaj homoj.
 - 4.1. La Fakgrupo provas atingi tiun ĉi celon per jenaj agadoj:
 - 4.1.1. apogado ĝenerale al ekzistantaj Esperantistaj organizaĵoj, kun aparte favora apogado al tiuj organizaĵoj kiuj aŭ instruas la lingvon aŭ provas ebligi pli altnivelan konon de la lingvo per fakaj vortaroj kaj studlibroj;
 - 4.1.2. agadoj por ebligi la eldonadon de faka terminaro por la kampoj de komerco kaj ekonomiko, kaj la daŭran laboron ĝisdatigi tian terminaron;

- 4.1.3. agadoj por ebligi renkontiĝojn de Membroj de la Fakgrupo, kaj por starigi studseminariojn je kiuj estu prezentataj referaĵoj pri esploroj faritaj en la apartaj kampoj de komercaj rilatoj, ekonomiko kaj merkatesploraj rezultoj;
- 4.1.4. subtenado de Membroj agantaj por aranĝi negocojn inter si aŭ inter ĉiuspecaj organizaĵoj, uzante la internacian lingvon, Esperanto;
- 4.1.5. eldonado de faka bulteno aŭ de alia formo de revuo, kaj/aŭ subtenado de aliaj revuoj, precipe per varbado de reklamanoncoj, (ekzemple de entreprenoj), en la internacia lingvo, Esperanto, kaj verkado de fakaj artikoloj;
- 4.1.6. laŭebla subtenado de ĉiuj agadoj de Esperantistoj pliakrigi konscion de la valoro de Esperanto en la apartaj kampoj de intereso, kaj aparte por plibonigado de komercaj rilatoj inter la tiel-nomata 'tria mondo' kaj de evoluintaj landoj, kaj
- 4.1.7. aplikado de aliaj jure permesitaj rimedoj, kiuj alproksimigas la celon de la Fakgrupo.
- 4.2. Por la plenumo de sia celo, la Fakgrupo rajtas akcepti aŭ akiri proprajn, akumuli kapitalon, fari investojn, ricevi rentojn kaj dividendojn el investoj faritaj, kaj dungu oficistojn.
5. La oficiala lingvo de la Fakgrupo estas la Zamenhofa lingvo, Esperanto, tia kia ĝi estas difinita per la Fundamento de Esperanto kaj oficialigita per la Akademio de Esperanto.
- 6.1. Ordinaraĵoj Membroj de la Fakgrupo povas esti:
- (a) ĉiu individua persono kiu subtenas la celon kaj pretas akcepti ĉiujn devojn preskribitajn en tiu ĉi Statuto, kaj
- (b) iu organizaĵo, kiu uzas aŭ pretas uzi la internacian lingvon, Esperanto, por komercaj rilatoj aŭ ekonomiaj interŝanĝoj, aŭ pretas apogi tian uzadon.

Principe, ĉiu Membro havas la rajton je unu voĉo en iu voĉdonado, ĉu pri ŝanĝo en tiu ĉi Statuto, ĉu pri iu alia decido, kiu leviĝas el aplikado de tiu ĉi Statuto.

Membreco aŭtomate implicas la devon finance kontribui al la mastrumado de la Fakgrupo.

Organizaĵo-Membro anoncas al la Ĝenerala Sekretario la nomon de individua persono, ne necese Ordinara Membro de la Fakgrupo, kiu ĝuas la fidon de tiu organizaĵo kaj rajtas reprezenti ĝin al la Fakgrupo.

- 6.2. Honoraj Membroj de la Fakgrupo povas esti tiuj individuaj personoj kiuj, pro rekonataj meritoj por la Fakgrupo, estas invitataj akcepti honoran membrecon sekve de unuanima decido de la ceteraj membroj dum ĝenerala kunveno aŭ per perpoŝta voĉdonado.

Honora Membreco ne implicas la devon fari regulajn kontribuojn al la kaso de la Fakgrupo.

- 7.1. La gvidado de la Fakgrupo estas konfidata al Estraro, elektita de la Ordinaraĵoj kaj Honoraj Membroj de la Fakgrupo el inter la individuaj Ordinaraĵoj Membroj. Estrarano tenas sian oficon por du jaroj ekde elekto, sed rajtas prezentiĝi por re-elekto.

- 7.2. La Estraro konsistas el Prezidanto, Ĝenerala Sekretario kaj du ĝis kvin aliaj Estraranoj, inkluzive de Vicprezidanto kaj Financa Konsilanto.

- 7.2.1. La Prezidanto reprezentas la Fakgrupon, kaj subskribas kun la Ĝenerala Sekretario la ĉefajn dokumentojn. La Prezidanto prezidas en la Estraro kaj en ĝeneralaj kunvenoj, sed rajtas portempe transdoni tiun prezidan rolon al la Vicprezidanto aŭ al portempa prezidanto, se necese.

7.2.2. La Ĝenerala Sekretario:

- (a) zorgas pri la efektivigo de la decidoj de la Estraro;
- (b) proponas al la Estraro iniciatojn por decido, kaj
- (c) ĝenerale prizorgas la eksterajn rilatojn de la Fakgrupo.

7.3. La kason de la Fakgrupo prizorgas la Financa Konsilanto, (aŭ la Ĝenerala Sekretario en anstataŭo), kiu krome regule raportas al la Estraro pri la evoluo de la fakgrupaj financoj.

7.4. La Estraro kunmetas ĉiujare raporton pri la agado de la Fakgrupo, inkluzive de raporto de revizoroj aprobante la kontotenadon, kaj tiun kombinitan raporton publikigas en la daŭro de maksimume kvar monatoj post la fino de la kalendara jaro al kiu ĝi rilatas. Principe, plena okazo por diskuto estu donata dum ĝenerala kunveno de la membraro, cele al aprobo de la raporto, sed en jaro dum kiu ĝenerala kunveno ne okazas, aprobo de la raporto sekvas aŭtomate du monatojn post publikigo, krom se pli ol duono de la membroj skribe al la Ĝenerala Sekretario indikas malaprobos. Alikaze, anonco de ĝenerala kunveno okazas samtempe kun publikigo de la raporto, kun minimuma averto de du monatoj.

8. Ĝeneralaj kunvenoj de la membroj okazu principe unufoje dum la jaro, prefere en la kadro de Universala Kongreso aŭ dum simila manifestacio de la Esperantista publiko. La ĝeneralaj kunvenoj estas okazoj ne nur por doni aprobon al la jarraporto kaj elekti la Estraron, sed ankaŭ por aŭdigi kaj diskutigi referaĵojn pri fakaj esploroj faritaj de membroj. Elekto de membroj de la Estraro okazas per skriba voĉdonado perpoŝta, se ne eblas en la koncerna jaro okazigi ĝeneralan kunvenon.

9. En okazo de neceso dissolvi la Fakgrupon, la Estraro per simpla plimulto da voĉoj, aŭ la laste restante funkcianta Estrarano, nomas komisionon kiu likvidas la kurantajn aferojn kaj transdonas iujn restantajn havaĵojn al Universala Esperanto-Asocio, kun la celo utiligi tiujn havaĵojn por similaj celoj.

Esperantaj nomoj por entreprenoj aŭ produktoj

S-ro Picasso proponas, ke ni agu pere de nacilingva korespondado kun "tiuj lokaj entreprenoj, kies nomo aŭ produktonomo estas esperantlingva (ekz. La Domo Bv, Eterna SA, Ondo Ltd)."

Li rekomendas sekvonttipan leteron.

Al la komerca direktoro de ..., iom surprize ni konstatis, ke la nomo de via entrepreno (produkta nomo) estas esperantlingva vorto, kiu signifas Eble intence, aŭ eble ne. En ĉiu kazo tio frapas la atenton de la tuta Esperanto komonumo.

Kiel vi scias, ĉu vi selektis la nomon intence, aŭ kontraŭe, estus bone, ke vi sciu, ke nia diaspora komunumo, kovranta preskaŭ (kial preskaŭ? - rim' de l' red') la tutan mondon, estas interligita per komunikado kaj atentigas la aferojn rilate al Esperanto.

Tio signifas, ke la nomo de via entrepreno/produkto povas favore soni en la oreloj de la esperantistoj.

Multaj esperantistoj estas samtempe profesiistoj en komerca fako, aliaj estas respondeculoj en entreprenoj. Volonte ili preferus vian varon al alies, ĝuste pro la esperanta nomo.

En esperantistaro estas ankaŭ komerca fako, kiu laboras celante al uzado de nia lingvo por komercaj rilatoj kaj disvastigi la uzadon de la lingvo en la komerca mondo. La internacia lingvo Esperanto estas pro sia reguleco kaj internacia vortotrezoro facile lernebla kaj pretas al novtipa pli persona kaj homa interrilato.

Ni deziras por nia statistiko, koni la kialon de via selekto en tiu nomo kaj rekomendas al

vi, ke vi, kiel unua paŝo reklamu vian firmaon fare de tiucela reklamanonco en Esperantista revuo, ekzemple en MONATO aŭ FOKUSO. Kiel pruvo mi aldonas kopion de tia reklamanonco de firmao ... , kiu jam aperis."

sincere ...

Permeson mi petas por tutpersona aldono al la estimata propono de d-ro Picasso.

Kiel pruvo por la lingva taŭgeco, mi proponas skribi dulingvan leteron, kaj nacilingve kaj Esperanto.

Eventuala sukceso, impresi firmaa(j)n reprezentanto(j)n pere de jam aperintaj reklamanoncoj bezonos (aŭ devigos), laŭ mia opinio, almenaŭ tutan revuon. Ekzemple Monato, n-ro 5, majo 1989, dorsflanke kun impresa, kol^ora anonco de SIEMENS. /dk

Bonvenon al niaj novaligintoj!

S-ro Du Shou He (IKEF 80)
7-7C Cuihua Huayuan
Shenzhen, Ĉinio

S-ro Clair Mahé (IKEF 81)
Les Jardins du Soleil
Boulevard de Barrière
F-63500 Issoire, Francio

S-ro Luigi Polese (IKEF 82)
Piazza G. Grandi 6
I-20135 Milano, Italio

S-ro Matubara-Hatirō
Namimatutyō 4-5
Kisiwada-si (Oosaka-hu)
-596- Japanio

Sukcesplenan kunlaboradon mi deziras al vi.

La jara membrokotizo estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Ciuj, kiuj intencas kunlabori/subteni la klopodojn apliki Esperanto en komerco kaj ekonomio estas invitataj igi IKEF-ano. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membrokotizo.

Kontoj: Je la nomo de IKEF, p.a. S-ro Roland Rotsaert ĉe: UEA aŭ: Belga poŝtĉekkonto, Bruselo n-ro 000-1592629-83

Perantoj:

Francio: S-ro François-Xavier Gilbert,
Vert Coteau, Longeville-en-Barrois,
F-55000 Bar-le-Duc, (CCP 1275-89 L Nancy)

FR Germanio: S-ro Franz Josef Braun,
(Volksbank Bühl n-ro 713120, BLZ 662914000)
Hornisgrindestraße 8,
D-7580 Bühl 16

Hungario: D-ro István Gether,
Varsányi Irén út. 8,
H-1027 Budapest

Italio: D-ro Marco Picasso,
via de Gasperi 7,
I-20057 Vedano al Lambro

Jugoslavio: S-ro Sotir Taleski,
ul. 'Oslo'br. 12,
YU-91000 Skopje

Nov-Zelando: S-ro John C. Rapley,
P. O. Box 70-038,
Ranui, Aukland 8

Togolando: Gbeglo Koffi,
B. P. 13169,
Nyékonakpoé, Lomé

Kontribuantoj, kiuj posedas **IBM-kongruan komputilon**, ege helpus al mi spari tempon, se ili favore kunsendus siajn informojn sur disketo. (Se nur ies sekretari(in)o uzas ĝin ektravigis ŝanco iomete instrui la lingvon.) Ankaŭ fremdan formaton volonte mi provus legi.

Subskribintoj respondecas pri la enhavo de siaj artikoloj. La aperigo entute ne signifas samopinion, nek de la eldonanto, nek de la redaktoro.

La **rajtoj de represio** estas malferma, antaŭkondiĉe, ke la fonto estas klare indikota. Pruvekzemleroj estas petataj.

Reklamtarifoj, en belgaj frankoj: tutpage 1800; $\frac{1}{2}$ pago 900; $\frac{1}{4}$ pago 500. 33% rabato por tri-foja sinsekva aperigo de la sama anonco. Membroj generale ricevas rabaton de 25%.

Varbi anoncojn estas ege favora rimedo subteni nian movadon; eĉ duflanke ekonomie: finance kaj reputacie. /dk

Elvidante al la venonta Merkato ekspektu

- raporton pri la ĝenerala kunveno dum la UK
- "Kio estas **Marketing?**"
Pripensojn rilate al merkataj studoj ...
de d-ro Marco Picasso
- opiniojn, diskutkontribuojn, demandojn, terminarajn pripensojn kaj aliajn raportojn
farita de vi?

Rilate al la lasta paragrafo mi intencas provoki vin, iĝi konscia pri fakaj terminoj vialande kaj viaprofesie kaj raportu pri tiu. Ĉu faklingve signifas angla-lingve, aŭ ankaŭ/ankoraŭ ekzistas nacilingvaj vortoj, kiuj esprimas la saman. Ĉu fakterminoj - plej ofte anglaj - flustre, sed danĝere, influas nian lingvopovon? - Bonvolu !